‚Mutig vorwärts!‘ ‚Kuraĝe antaŭen‘

Aŭstria Esperantisto
(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

11a jaro. N-ro 6 Monata Junio 1934

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ S 3.90, germanlandanoj RM 2.75 alilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Internationale Konferenz in Wien „Esperanto in die Schule und Praxis“

Ansprache des Regierungsrates Hugo Steiner an den Bundespräsidenten von Oesterreich, Herrn Wilhelm Miklas, anläßlich der Audienz der Teilnehmer an der Internationalen Konferenz „Esperanto in die Schule und Praxis“ am 22. Mai 1934 um 12 Uhr 30.

Hochverehrter Herr Bundespräsident!

In einem Zeitraume von zehn Jahren wurde Wien nun zum drittenmale der Schauplatz eines Treffens, das Esperanto betrifft. Im Jahre 1924 tagte in Wien der 16. Internationale Esperanto-Weltkongreß und in zwei Jahren wird neuerdings der Esperanto-Weltkongreß in Oesterreich tagen, und vor fünf Jahren feierten die Esperantisten der ganzen Welt die Gründung des Internationalen Esperanto-Museums, dessen Ehrenschutz Herr Bundespräsident ebenso wie den der heutigen Veranstaltung übernommen haben, einer Veranstaltung, die es sich zum Ziele gesetzt hat, die Einführung des Esperanto in die Schulen, vorerst als Wahlgegenstand, und die Verwendung des Esperanto, auf viel breiterer Grundlage als bisher, als Mittler für internationale Verständigung auf allen Gebieten des praktischen Lebens in die Wege zu leiten.

Herr Bundespräsident sowie die österreichische Regierung haben in vorbildlicher Weise für alle Staaten der Welt diesem hohen Ziele, die Menschen durch eine gemeinsame Hilfssprache einander näherzubringen, Ihre Hilfe angedeihen lassen.

Namens der der Konferenz sich angeschlossenen Korporationen, Unternehmungen, öffentlichen Stellen aus mehr als 25 Ländern sage ich hiefür herzlichsten Dank, als Oesterreicher muß ich erklären, daß ich stolz darauf bin, daß gerade unser Land auch in dieser Kulturbestrebung mit an der Spitze marschiert.

Sekvas la Esperanto-traduko.

Erwiderung des Herrn Bundespräsidenten:

Ich danke Ihnen Herr Präsident für die freundlichen Worte, die Sie mir im Namen der Delegierten zu der jetzt in Wien tagenden Esperanto-Konferenz entboten haben. Ich erwidere Ihre freundlichen Worte meinerseits mit dem besten Willkommgruß an alle liebwerten Gäste, die sich von nah und fern zu dieser Wiener Esperanto-Konferenz hier eingefunden haben. Sie sind hier, meine Herren, zusammengekommen, um in gemeinsamer Beratung Mittel und Wege zu suchen, wie dem Esperanto in Schule und Praxis zum Durchbruch verholfen werden könne. „Esperanto en la lernejon kaj praktikon“ — haben Sie ganz offiziell als Untertitel Ihrer Einladungen zur Wiener Konferenz verkündet. Wenn es mir auch fernliegt, zu den Einzelheiten Ihres Verhandlungsgegenstandes Stellung zu nehmen, so bin ich doch glücklich, Ihre Bestrebungen auch vom Standpunkte meines Vaterlandes aufs wärmste begrüßen zu können, und daran meine besten Wünsche für einen vollen Erfolg Ihrer Beratungen zu knüpfen. Oesterreich ist ein freier, selbständiger deutscher Staat. Aber es hat im Herzen Europas auch eine hohe europäische, universelle, völkerverbindende Mission und ist allezeit nach besten Kräften bestrebt, dieser österreichischen Sendung gerecht zu werden. Es begrüßt daher alles, was den gleichen Zielen dient und irgendwie zur besseren Verständigung der Völker beiträgt. Dazu gehört auf sprachlichem Gebiet gewiß auch die möglichste Verbreitung einer modernen, leicht erlernbaren Hilfssprache, wie es das Esperanto ist, dessen sich alle bedienen können, ohne damit irgendwelchem nationalen Empfinden oder nationalen

Gefühlen der Mitredner nahezutreten. Ich bilde mir freilich nicht ein und gewiß auch Sie nicht, meine Herren, daß wir etwa in Zunkunft das Erlernen und den Gebrauch der großen lebenden Weltsprachen entbehren können. Das wird niemals der Fall sein. Aber als Hilfssprache wird das Esperanto doch in vielen Fällen immer sehr wertvolle Dienste leisten. Alle, die es schufen und propagieren, erfüllen daher im besten Sinne des Wortes eine völkerverständigende Mission.

Schreiten Sie daher wohlgemut und hoffnungsfreudig an die Beratung Ihrer Wiener Internationalen Konferenz.

Indem ich Ihnen nochmals im Namen Oesterreichs freundlichen Gruß entbiete, gebe ich der Hoffnung Ausdruck, daß Ihnen, meine Damen und Herren, neben und außerhalb Ihrer Kongreßberatungen auch noch Zeit und Muße bleiben, sich ein bißchen in Oesterreich umzusehen, Land und Leute kennen, unsere Jahrhunderte alten Kulturschätze und Einrichtungen schätzen zu lernen und die landschaftlichen Schönheiten unserer österreichischen Heimat zu bewundern. Mögen Sie auch in dieser Hinsicht von Oesterreichs Volk und Land die allerbesten Eindrücke empfangen und, wenn Sie wieder in Ihre ferne Heimat abreisen, den herzhaften Entschluß fassen, recht bald wieder nach Wien und Oesterreich zu kommen.

In dieser Hoffnung heiße ich Sie nochmals alle, meine Damen und Herren, auf das herzlichste willkommen.

Internacia Konferenco: Esperanto en la lernejon kaj praktikon

Sabaton, la 19-an de Majo, okazis salutvespero, en kiu reg.-kons. Steiner nome de la prepara komitato salutis la alvenintajn konferencanojn, precipe la eksterlandajn gastojn el 25 landoj. Prof. Bujwid-Krakow respondis nome de la eksterlandaj partoprenantoj kaj dankis s-ron reg. kons. Steiner pro la grandaj preparaj laboroj.

La solenan malfermon de la konferenco je dimanĉo la 20 a, antaŭiris festa diservo en la malnova Minoriten-preĝejo, arangita de Katholischer Schulverein je kunlaboro de Kat. Unuiĝo Esp., kun Esperanto-prediko de ĝeneraldirektoro **d-ro Brunauer**.

La sanktan meson celebris prelato, militprovikaro **Karl Koczy**. „Ave Mario" en Esperanto laŭ melodio de Johann Chiba kantis belege koncertkantistino **Hilde Nemetschek-Hofmann**, en Esperanto kaj germana lingvo kantis **„Vienaj ĥorknaboj"** sub direktado de **Viktor Mick**.

Precize je la 10-a 45 komencis la solena malfermo en la parlamentejo, en tiu fame bela grekstila palaco ĉe Ringstrato simila al templo sur Akropolis en Athen. Kiam la ministro por komerco kaj trafiko Fritz Stockinger eniris la plenplenan salonegon de la deputitoj, la knaba ĥoro ekkantis la Aŭstrian himnon.

Salutis s-ro reg. kons. Steiner s-ron la ministron, la reprezentanton de l' ministro por instruaferoj sekcian ĉefon d-ron Pohl, la reprezentanton de l' urbestro, la ĉeestantajn diplomatojn kaj ĉiujn konferencanojn kaj gastojn. Per kelkaj frazoj li klarigis la celojn de la konferenco, dankas al la federaciaj prezidanto kaj kanceliero pro la subteno al la konferenco kaj speciale la ministron por komerco kaj trafiko, kiu ne nur morale subtenis, sed finance e b l i g i s la konferencon.

Tiam supera magistrata konsilisto **Stollewerk** nome de la urbestro de Vieno, ministro Richard Schmitz, kore bonvenigis la konferencanojn en la urbo Vieno, deziris al ili sukcesan laboron kaj krom tio agrablan restadon. — **Ministro Fritz Stockinger** salutis la konferencon nome de la ŝtatprezidanto kaj de la tuta Aŭstria registaro. Li akcentis speciale la valoron de Esperanto por la fremdultrafiko, raportis pri la faritaj bonaj spertoj en sia ministerio. Li varme pledas por la enkonduko de Esperanto en la internaciajn komercajn rilatojn kaj speciale en la komercan korespondadon. Li finis en Esperanto kaj deklaris la konferencon malfermita.

Sekvis la salutparoladaj de la diplomatiaj reprezentantoj kaj de la delegitoj de la diversaj korporacioj ktp. La alparoloj okazis en la nacia lingvo kaj estis tuj tradukitaj en Esperanton, kelkaj delegitoj tradukis sin mem. Ambaŭ proceduj multe impresis al la publiko. Inter aliaj parolis ankaŭ prof. Lugmayer, ŝtata konsilanto por la popolklerigado en Vieno, deklaras sian pretecon subteni la Esp.-movadon kaj anoncas starigon de Esperanto-Instituto en la kadro de la oficialaj popolklerigaj institucioj kaj d-ro Matejka, refer. por klerigaj aferoj ĉe Laborista Ĉambro kaj vicprez. de Popolhejmo, kiu deziras kunhelpi en la kadro de sia laborkampo.

Germanan festprologon verkitan de Viktor Anton **Psenner** deklamis la aŭtoro mem.

Du kantojn de Schubert kantis la Vienaj **ĥorknaboj** kaj rikoltis grandan aplaŭdon. La fortepianon disponigis la firmo Stingl-AG.

Nun sekvis tri gravaj paroladoj, kiuj celis ĝeneralan enkondukon de la ĉeestanta publiko en la idearon de nia klopodado. Land instru-inspektoro, kortega konsilisto doktoro **Wollmann** parolis pri la temo „Es-

eranto kaj la lernejo", prof. kortega konsilisto inĝ. Petritsch, prof. de la Teknika Altlernejo de Vieno, pritraktis la vidpunkton de scienco kaj tekniko koncerne Esperanton kaj d-ro inĝ. Eugen Wüster kiel reprezentanto de la regna unio de la industriuloj de Aŭstrio parolis pri la internacia normigo kaj la rolo de Esperanto en ĝi.


Per la Esperanta himno, kantita de la orknaboj, la soleno finiĝis.

La Malferma Kunveno postlasis grandan impreson. La tre impona parlamenta salono, ĝis nun nur dufoje disponigita por internaciaj aranĝoj, kaj la solena kadro de ĉio donis al la Konferenco eksterordinaran karakteron.

La tradukado de direktoro Kreuz el germana, franca, hispana, portugala lingvoj en Esperanton kaŭzis vere sensacion, speciale ĉe la ĵurnalistoj, kiuj tion speciale menciis en siaj gazetraportoj.

St. Georg-skoltoj kaj Esperanto-parolantaj policistoj kun la konata oficiala distingilo zorgis pri la orientado de la 1100 ĉeest.

Post la teo en Ministerio por Instruaferoj:



Sidante de dekstre: Sekcia ĉefo d-ro Uebelhör, dir. Kreuz, ministro d-ro Kurt von Schuschnigg, prezidanto Steiner, federacia kanceliero d-ro Engelbert Dollfuss, prof. d-ro Odo Bujwid, kalk. kons. Frey.

Raporto pri la laborkunsidoj.

Lunde la 21-an de Majo, je la 9-a horo, okazis la unua laborkunsido en la granda kunsidejo de la landa parlamentejo de Malsupra Aŭstrio. Ĝi komenciĝis per provleciono sub la titolo »La facila Esperanto« prezentita de s-ro Werner (Vieno). Ĉar ĉeestis preskaŭ nur esperantistoj, la provleciono estis, kiel enkonduke diris la prezentanto, malpli provo de leciono ol pli vere leciono pri la facileco de Esperanto. Tion celis demonstri kelkaj tabeloj pri la alfabeto, la deklinacio kaj la gramatikaj finaĵoj kun internacie kompreneblaj vortoj. Pro la dirita manko de neesperantistoj la provleciono estis cetere mallongigita.

Post tio oni ektraktis kiel unuan ĉeftemon de la konferenco la temon »Esperanto kiel unua lingvo en la instruado de fremdlingvoj.

Raportis unue prof. Gustav Scholze, kiu instruadas Esperanton depost 10 jaroj en la ŝtata meti-lernejo de Reichenberg (Ĉeĥoslovakio). Li prezentis jenan tabeleton pri la rezultoj de la Esp.-Kursoj:

	I tre bona	II bona	III kontentiga
1-a grupo: Lernantoj, kiuj antaŭe jam lernis fremdlingvon:	30 %	65 %	5 %
2-a grupo: Lernantoj, kiuj antaŭe ne lernis fremdlingvon:	50 %	30 %	20 %

Prof. Scholze resume konstatis, ke la lernantoj volonte lernas Esperanton, kiu estis al ili facila kaj ke ĉe'unu horo en la semajno dum du sinsekvaj jaroj sufiĉas por la sukceso. En la dua jaro oni precipe korespondadas kun eksterlando. — Li fine akcentis la grandan formal- edukan valoron de Esperanto, kiu liaopinie pravigus la ĝeneralan enkondukon de Esperanto, ankaŭ se oni dubus pri ĝia valoro kiel internacia interkomprenilo.

Lektoro Beckmann, Karlskrona (Svedujo), simile raportis pri rezultoj de Esp.-kursoj farita de rektoro Jansson kaj de la instruistoj Malmgreen kaj Seppik.

Speciale interesan raporton prezentis prof. Sygnarski el Bydgoszcz (Polujo). Jam de 10 jaroj interesite pri Esperanto, li nur post la Universala Kongreso en Kraków, partoprenínte Cseh- kurson, fariĝis instruanto kaj propagandanto de Esperanto en sia gimnazio. Tuj por la unua kurso anoncis sin 66 % de la gimnazianoj. La intereso de la lernantoj estis grandega, multaj centoj da leteroj jam estas interŝanĝitaj kun la plej diversaj landoj. Lastatempan enketon al ĉiuj lernantoj de la gimnazio partoprenis 96 % de la lernantaro. La detaloj de la rezulto estas ankoraŭ ne prilaboritaj. Krom la lernantoj la raportanto gajnis ankaŭ la urbestron kaj la dis- triktestron por Esperanto. Finante li refoje akcentis, ke li dankas la grandan sukceson al sia rapida perfektiĝo per la Cseh-metodo.

La dua, tria kaj kvara laborkunsido okazis en la alia fama salonego de la sama landestra domo, en la »kavalirsalono«. Laŭ peto de Aŭstriaj instruistoj, kiuj nur mardon post Pente- kosto, sed la sekvintajn tagojn ne plu estis liberaj, oni ŝanĝis la programon tiel, ke oni unue fintraktis la temon »Esperanto kaj la lernejo« kaj lasis la duan ĉefparton »Esperanto en la praktiko« al la du lastaj tagoj.

Laŭ tio la 22-an de Majo unue parolis s-ino Berger, Vieno, kiel reprezentantino de la franca movado por reformo de l' edukado »Nouvel Education«. Ĝi volas akceli la impulsan aktivecon de la infanoj kaj en lernejo kaj en familio. La movado uzas Esperanton kun bonaj sukcesoj, precipe por la korespondado inter infanoj de diversaj landoj. Oni provis instrui Esperanton al tute junaj infanoj, kiuj ankoraŭ ne scipovis legi la gepatran lingvon, kaj trovis, ke post lerno de Esperanto la infanoj pli facile lernis la (cetere malfacilan) legadon de franca lingvo.

En la sekvanta diskuto partoprenis la profesoroj Bujwid, Scholze kaj Sygnarski. Tiu ĉi ra- portis pri interesa eksperimento. Oni instruis en du paralelelaj klasoj: en la unua klaso la unuan jaron Esperanton, la duan jaron la francan, en la dua klaso ambaŭ jarojn nur la francan lingvon. Montriĝis, ke la partoprenintoj de la unua klaso, preparite per Esperanto, en la fina rezultoj franclingvaj multe superis tiujn de la dua klaso Ankaŭ aliaj ĉeestantoj atestis la help- on de Esperanto por la progreso en aliaj lingvoj.

S-ro Alseika, Litovujo, kiu oficiale reprezentis la Litovujan ministerion por instruaferoj elmontris la signifon de Esperanto por malgranda nacio. Ja la anoj de malgrandaj nacioj devas lerni almenaŭ unu grandan lingvon pli ol la anoj de grandaj nacioj.

S-ro Lidl, Salzburg (Aŭstrio), multjara pioniro de Esperanto-movado en la provincaj landoj de Aŭstrio, postulis la enkondukon de Esperanto kiel devigan fakon en la unuan klason post la elementaj lernejoj. Komenciĝis longdaŭra debato pri la demando, ĉu la konferenco postulu la devigan aŭ la nedevigan enkondukon de Esperanto. Univ.-Prof. Sirk, Ljubljana (Jugoslavujo), atentigis, ke estas praktike egale, ĉu oni postulas tion aŭ tion ĉi, ĉar ĉiuokaze oni atingas maksimume nur la nedevigan enkondukon de Esperanto. S-ro Rousseau, Paris, s-ino Wele- minski, Praha, kaj aliaj, opinlante, ke la ĝisnuna nedeviga instruado de Esperanto ne sufiĉis, de- klaris ke estas jam tempo, postuli de la registaroj decidan paŝon koncerne la ĝeneralan enkon- dukon de Esperanto en la lernejojn En la plua debato partoprenis Prof. Kilian, oficiala sendito de Radio-Journal Brno, Prof. Christanell, Salzburg, Prof. Sirk, Ljubljana, kort. kons. d-ro Wollmann, Vieno, s-ro Roome, Sheffield (li pledis por la enkonduko en la instruistajn seminariojn), lerneja konsilisto Schöpfer, Voitsberg (Aŭstrio), prof. Dalmau, Barcelona, lektoro Beckmann, Karlskrona, direktoro Kreuz, Ĝenevo, kaj multaj aliaj. Prof. Kilian, Brno, prave atentigis, ke la granda publiko rigardas Esperanton kun malrespekto. Tial oni devas ankoraŭ pli multe klerigadi la publikon, plej bone per Radio-paroladoj. Li uzas paroladojn de enlande famaj profesoroj por Esperanto-radio-paroladoj, parte ankaŭ por plivalorigi Esperanton en la opinio de la profesoroj. Fine li anoncis altan celon: per kunigo de kelkaj mezeŭropaj send- stacioj aranĝi tuteŭropajn Esperanto-dissendojn!

Koncerne la enkondukon de Esperanto en la Aŭstriajn komerclernejojn s-ino fakinstruistino Ziwutschka, Vieno, raportis, menciante la samtempe okazantan fak-konferencon de komerc- lernejaj geinstruistoj, ke ĝuste nun oni enkondukis du novajn devigajn fakojn: religion kaj sci- encon pri komercaĵoj en la instruplanon de la Aŭstriaj komerclernejoj. — D-ro Maier, Vieno proponis redakti la rezolucion tiel, ke ĝi permesu laŭ la cirkonstancoj, diversaj en la diversaj landoj, peti devigan aŭ nedevigan instruadon de Esperanto. S-ino Berger, Vieno, rimarkigis, ke ĝenerale oni taksas sufiĉe ne grava la nedevigan instruadon de iu fako, kaj porekzemple citis la lernadon de stenografio kiu ŝiaopinie montras nekontentigajn rezultojn.

S-ro Werner, Vieno, sciigis proponon de d-ro Pfeffer (ne ĉeestanta la konferencon): Oni proponu al la registaro (instruministerio), ke ĝi deklaru sin preta, enkonduki Esperanton en (certajn) lernejojn, kondiĉe, ke almenaŭ 5 aŭ 6 ŝtatoj deklaras la samon. — Responde dir.

Kreuz konigis la malfacilaĵojn, kiujn jam renkontis similideaj provoj pro tio, ke la promesintaj s-roj diplomatoj tro rapide forlasis siajn postenojn.

S-ro Rousseau, Paris, proponis: 1: dum 47 jaroj de praktika uzado Esperanto montris sin taŭga kaj senmanka interkomprenilo. 2. Ni opinias, ke la eksperimento daŭris jam sufiĉe da tempo kaj, ke la momento jam venis, por postuli de la registaroj definitivan solvon. 3. La konferenco turnu sin al la registaroj, ke ili ekstudu la rimedojn de l' enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Post ankaŭ kelkaj por- kaj kontraŭdiroj s-ro registara konsilisto Stengel, Vieno, kvazaŭ rezume proponis rezolucion, postulantan por la lernjaro 1934/35 la devigan enkondukon en la instruistajn seminariojn (en la antaŭlastan klason kun daŭriga kurso en la lasta klaso) kaj por la sekvonta instrujaro 1935/36 la nedevigan enkondukon en la ĉef- kaj mezlernejojn kaj komercajn lernejojn de Aŭstrio.

Oni ne voĉdonis pri la rezolucio, sed lasis la finredakton de la definitiva rezolucio pri la temo »Esperanto en la lernejon« al speciala redakta komitato.

Dua ĉeftemo de la konferenco: Esperanto en la praktikon:

Laŭ peto de la konferencprezidanto la konferenco celis, ne nur aŭskulti kaj kolekti raportojn pri spertoj faritaj, sed ĉefe celis kolekti novajn instigojn por la plua kaj pli ampleksa aplikado de Esperanto sur ĉiuj kampoj. Nur la posta prilaboro de la tuta materialo plene montros la rezultojn de tiu parto de la konferenco.

Lingvaj malfacilaĵoj. S-ro prof. Dalmaŭ, Barcelona, por demonstri la necesecon de Esperanto, rakontis tre interese pri la lingvaj malfacilaĵoj en sia lando: Ekzemple, koncerne tradukojn el la kataluna lingvo en la germanan. La tieaj profesoroj de la germana lingvo ne plu scias la korektan germanan idiomon kaj aliflanke la ĵus alvenintaj germanoj kompetentaj pri sia gepatra lingvo, ankoraŭ ne sufiĉe scipovas la katalunan lingvon, tiel ke estas ĉiam tre malfacile, trovi vere taŭgajn tradukantojn. S-ro Dalmau parolis ankaŭ kelkajn minutojn tre malrapide en la kataluna lingvo kaj estis bone komprenata de ĉiuj sciantaj iun latinidan lingvon. Poste li komunikis du okazintaĵojn, kiuj evidente pruvas la nesufiĉecon de la naciaj lingvoj por la internacia interkomunikiĝo. Tie ĉi estu citita nur la dua: Japana firmo, mendinte hispanan vinon, ricevis de la hispana firmo anglalingvan prospekton. Ĝia angla lingvo estis tiel malbona, ke la Japanoj ne povis kompreni ĝin. Tial ili per la adreso de UEA, s-ro Dalmau, turnis sin al la hispana firmo per esperanta letero, petante la firmon, ke ĝi, se ĝi ne scipovas apliki Esperanton, prefere skribu en sia enlanda lingvo anstataŭ en la angla, kiu estas fremda kaj malfacila al ambaŭ partoj.

Esperanto en la komerco. S-ro dir Kreuz, Genevo en mallonga referato proponis, antaŭŝtupe al la enkonduko de Esperanto en la komercon, uzi ĝin laŭ la maniero de la »ŝlosiloj«: Oni simple skribas leteron al eksterlandano en Esperanto, aldonante ŝlosilon Esperantan por la lingvo de la adresito. Aldone li proponis rekomendi al la praktikistoj, ke ili post uzo de Esperanto kiel kodan lingvon enkonduku ĝin kiel lingvon de korespondado. (Tion ĉi ankaŭ akcelis la Aŭstria ministro por komerco kaj trafiko, Fritz Stockinger, en sia parolado okaze de la malfermo de la konferenco je la Pentekosta dimanĉo.)

Fervojoj: Pri apliko de Esperanto ĉe la fervojoj de Ĉeĥoslovakio raportis ĉeĥlingve ministeria konsilisto Hondl, oficiala reprezentanto de la ĉsl. ministerio de fervojoj. Jen resumo de la raporto laŭ la Esp.-traduko de prof. Kilian: La ministerio tre atente sekvas la Esp.-movadon pro ĝia valoro por la turismo kaj sekve por la fervojaro. Tial la ministerio eldonis ankaŭ propagandilojn en Esp.: gvidlibron pri la ŝtataj fervojoj, broŝuron pri Alta Tatra kaj nun preparas novan broŝuron pri la famaj ĉsl. banlokoj. Cetere la ministerio subtenas ankaŭ la studadon de Esperanto inter la fervojistaro.

Pri la apliko de Esperanto ĉe la fervojoj de Aŭstrio parolis nome de ĉeestanta oficiala reprezentanto de la la Ĝeneraldirekcio de Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj, reg.-kons. Wolf, s-ro reg.-kons. Steiner: Aŭstrio estas la unua lando, kie oni permesis la portadon de la Esp.-stelo dum deĵoro, dume aliaj insignoj nedeĵoraj estas malpermesitaj. En 1927 la propono de la aŭstriaj fervojoj federaciaj, permesi la alfikson de Esp.-lingvaj surskriboj en la translimaj vagonoj (kiel »Fumado malpermesata«, »Por fumantoj« ktp.), estis akceptata en la Konferenco de la fervojdirektoroj Eŭropaj en Bruxelles. Krome Ĝeneraldirekcio per specialaj cirkuleroj atentigis pri Esp.-kursoj kaj disponigis kursejojn. Ripetaj ekzamenoj kontrolas la lingvosciojn de la fervojistoj kiel en la fremdaj naciaj lingvoj, tiel ankaŭ en Esp. Tio koncernas la konduktorojn, kiuj deĵoras en la rapidtrajnoj.

Radio: Parolis prof. Kilian oficiala delegito de Radi -Journal Brno (ČSR): La esperantistaro jam distingis tiun stacion per la honora nomo »La verda stacio«. Ni volas meriti tiun ĉi honoron. Jam venis la tempo, por transiri de la nura propagando de Esp. al serioza apliko por kulturaj celoj. Esp.-dissendoj estas ankaŭ plej malmultekosta propagando por lando, varbanta fremdulojn. Ĵus la geaktora societo en Brno, servanta al Radio-Journal, partoprenis Esp.-kurson, por povi prezenti artaĵojn al internacia aŭskultantaro. Ne estas hazardo, diris la par lanto, ke Comenius, la unua profeto pri mondlingvo, kaj Masaryk, la nuna multestimata ŝtatprezidanto, estas naciaj saĝuloj, kies ideoj tre konformiĝas al tiuj de

Zamenhof. La cititaj altrangaj instruistoj montras la vojon al nia popolo, kiu deziras pace kaj frate kunlabori kun la ceteraj popoloj por la komuna kulturo de la homaro.

Polico: S-ro Schwartz, Strasbourg, sekretario de la Internacia Polica Ligo, mallonge klarigis la celojn de tiu ĉi organizo.

Speciale pri la uzo de Esp. ĉe la polico de Vieno raportis reg. kons. Steiner en ĉeesto de oficiala reprezentanto de Policdirekcio, s-ro polica ŝtabkapitano Harus. Reg. kons. Steiner jam de 5 jaroj instruas Esp.-on en la Viena policlernejo. La bela Esperanto-ŝildeto sur la brusto de la Vienaj strat-policistoj estas konata al la esperantistaro kiel unua en la mondo.

Turismo: Allige reg. kons. Steiner pro malhelpo de la koncerna referanto ministeria kons. inĝ. Deinlein parolis ankaŭ pri la belaj faldprospektoj, eldonitaj jam depost 7 jaroj, kiuj alportis bonan sukceson, tiel, ke ankaŭ en tiu ĉi jaro la nova »Varboficejo« en la ministerio por komerco kaj trafiko (estro kapitano Reichel, referanto dipl. komerc. Ortner) eldonis denove belegan faldprospekton, dediĉitan al Internacia Konferenco, kaj dissendis ĝin je siaj kostoj.

Pri la apliko de Esp. al la turismo, krom aludoj de multaj aliaj parolantoj, speciale referis unue dir. Hans Jakob koncerne la turisman servon de UEA. Sur la kampo de gvidfolioj nun du specoj estu ellaborotaj: 1. koncizaj gvidfolioj pri urboj, verkitaj en Esp., 2. alfaro de ekzistantaj nacilingvaj gvidfolioj al Esp. (Tiun tipon speciale bone evoluigis la Aŭstrianoj). Nome de la Hungara Turisma Federacio s-ro Kovacz elmontris la uzon de Esp. per tiu ĉi organizo kaj proponis: 1) la konferenco konsideru, ke en ĉiu turista centro estu turisma Esp.-sekcio, 2) per rezolucio estu komunikata al ĉiuj turismaj organizaĵoj la graveco kaj uzebleco de la helplingvo Esp. — Krome la Hungara Turisma Federacio petis la konferencon sin interrilatigi kun la prezidantaro de la Internacia Alpina Unuiĝo en Genève. Fine li esprimis la deziron, ke la konferenco aperigu kajeron pri siaj materialoj kaj rezultoj. (Okazos. Noto de la sekr.)

Poste por Jugoslavio s-ro Kozlevcar, Ljubljana, parolis pri la valoro de Esp. por la turismo precipe de la malgrandaj landoj. Li proponis: 1) oni diskonigu per Esp. la personaron de hoteloj, fervojoj, komercaj firmoj kaj aliaj entreprenoj rilataj al turismo, 2) oni eldonu Esp.-publikaĵojn pri siaj lando kaj urboj (prospektoj ktp.), 3) la internacia Esp.-centro iniciatu la eldonon de »Baedeker« en Esp., 4) laŭ la principo de Rotary-klubo fondiĝu Esp.-centro, kie la vojaĝantaj esperantistoj povus ricevi ĉiujn informojn bezonatajn. Li salutis la konferencon en la nomo de la urbestro de Ljubljana.

Lektoro Beckman, Karlskrona, Svedujo, parolis pri la sukcesplenaj turismaj aranĝoj perespertantaj inter Svedujo kaj Estonio kaj aldonis raporton pri siaj klopodoj interisigi la legantaron de sveda gazeto por Esp. — Li komencis per regula aperigado de kulture interesaj sciigoj, komunikitaj per Esp. (ekz religiaj movadoj en Japanujo, Hungara lirikon ktp.). Li rekomendis tiun procedon kaj petis la helpon de la ĉiulandaj esperantistoj.

Estante profesoro de historio, li tre pledis por la uzo de Esp. kiel traduka lingvo en la historia scienco, ĉar precipe en la studado de la historio de la nord-orient-eŭropaj popoloj oni estas grave malhelpata per la multaj lingvoj. Por komparo kaj bona kompreno estus necese havi ĉiujn sciencajn fontojn en unu sama lingvo. Tio estus grava afero ne nur por unu scienco kaj por kelkaj popoloj, sed por la tuta homaro. Oni povus per Esp. krei (komence almenaŭ en kelkaj partoj de Eŭropo) komunan historian percepton, kiu estus grava kondiĉo por interpopola harmonio kaj tutmonda paco. Li petis la konferencon, akcepti tiun ĉi instigon por la fina rezolucio.

Reprezentanto de Norddeutscher Lloyd, Bremen, raportis pri la nova varbado per Esp.-prospektoj. Parolis ankoraŭ la konsuloj de Finnlando, Peruo ktp.

Patentjuro. D-ro Hampel, Vieno, (germanlingve) klarigis la malfacilaĵojn en la tradukado de juraj tekstoj rilate al internacia patentjuro. Li unue skizis la evoluon de tiu ĉi scienco, due elmontris kelkajn ekzemplojn de duba lingvouzo, kiu kaŭzis grandan domaĝon al tiuj, kiuj pensis esti protektitaj per la teksto de la patento, kaj trie postulis la enkondukon de Esp. kiel oficiala traduka lingvo en patentjuraj aferoj. Fine li prezentis du instigojn: 1. Komitato ellaboru la koncernan juran terminologion, 2. Oni faru oficialan peton al Bern-a Unio, ke ĝi allasu Esp.-on por la traktadoj de internacia patentjuro.

Dir. Kreuz mallonge respondis al la unua instigo, montrante la nunan staton de la teknikaj vortaroj. Li kaj ankaŭ UEA-prezidanto Stettler varme subtenis la proponon de d-ro Hampel.

Blinduloj: D-ro Geffner, Vieno, legante per Braila skribo, parolis pri la granda valoro de Esp. por la tutmonda blindularo. Li mallonge skizis la evoluon de Esp. blindul-movado, kiu grandparte ja estas konata al la esperantista legantaro. De 1931 ekzistas »Univ. Asocio de Blindul-organizaĵoj«, kiu havas membrojn en 18 landoj kaj delegitojn en 25 landoj. Li esprimis la specialan signifon de Esp. por la blinduloj per la citaĵo: »Se Esp. ne ekzistus, oni devus krei ĝin por la blinduloj«.

En la lastaj horoj la Konferenco okupiĝis pri la proponitaj rezolucioj, sed mem ne prenis definitivajn decidojn, lasante la finredakton de la rezolucioj al speciala redakta komitato sub gvidado de dir. Kreuz. Oni intencas ankaŭ, en aparta broŝuro publikigi ĉiujn detalojn kaj rezultojn de la konferenco.

Ernst Werner, protokolinto

Posttagmeza programo:

Dimanĉe: Ekskurso per tramo al Grinzing, promenado al Krapfenwaldl, tie kafotrinkado kaj interbabilado; promenado al Kobenzl, belega rigardo al la urbo; fine en Grinzing la verpero rapide preterpasis ĉe Viena muziko kaj kantado kaj bona vino.

Lunde: Ekskurso al Klosterneuburg per tramo kaj aŭtobuso, vizito al belega abatejo kaj fama preĝejo sub lerta gvidado. Poste promenado al la bordbanejo ĉe Danubo, kie UEA-del. Schauer nin akceptis. Urbestro d-ro Eselböck alparolis la gegastojn en ĉeesto de multaj bangastoj en Esperanto pere del aŭtparolilo, prez. Steiner en Esp. kaj germane repondis. Poste oni travivis ĝis la 22 h belajn horojn. Ankaŭ gaja filmo estis montrata al ni.

Marde: 12 h 30 **aŭdienco** ĉe la Ŝtatprezidanto, s-ro Miklas, protektoro de la Konferenco, en la fama salonego, kie okazis en 1814 Viena Konferenco. La ŝtatprezidanto afable parolis kun ĉiu konferencano, kiun prezentis prez. Steiner. La akcepto daŭris 3/4 horojn.

Poste vizito al fama Schönbrunn kaj ties ĉambraro kaj parko. Kafotrinkado en Tirolergarten kaj vespermanĝo ĉe Weigl, kie estis prezentata gaja Viena „Revue", ĉe kiu oni bone amuzis.

Merkrede: Vizito al la ĉambraro de Hofburg, poste la landaj reprezentantoj estis gastoj ĉe teo en la Ministerio por Instruado, kie ministro **d-ro Kurt von Schuschnigg** akceptis ilin. Ĉeestis ankaŭ dum pli ol unu horo federacia kanceliero **d-ro Engelbert Dollfuss**. Al ambaŭ prez. Steiner prezentis la gastojn aparte kaj tiuj ĉi estis ravataj pri la afableco de niaj eminentuloj. Ĉeestis entute ĉ. 90 personoj, inter ili ministro **Stockinger**, prez. de Oest. Bundesbahnen generalo **Vaugoin** kun ĝeneralsekr. kort. kons. **d-ro Kankovsky**, policprez. **d-ro Seydl**, diplomatoj, altrangaj oficistoj.

Je la 19 h ĉiuj estis konferencanoj gvidataj tra la belega ĉambraro de Rathaus (urbdomo), kie anstataŭante la urbestron eksvickanceliĉron ministron **Richard Schmitz**, vicurbestro d-ro **Kresse** salutis. Prez. Steiner tradukis en E-on kaj dankis.

Je 22 h 10 okazis parolado ĉe Radio Wien:

Impresoj pri Aŭstrio kaj Internacia Konferenco „Esp. en la lernejon kaj praktikon"

Steiner: Es sprechen Delegierte aus verschiedenen Ländern je einen Satz in ihrer Muttersprache und, soweit sie des Esperanto mächtig sind, in Esperanto. Am Schlusse folgt eine Zusammenfassung in deutscher Sprache.

Unue parolas s-ro **Roome el Sheffield**, Anglujo:

Ja, la veturo de Anglujo al Aŭstrio estas ĉarma.

Ĝeneralkonsulo de Brazilio:

La proverban ĝentilecon de la Aŭstrianoj oni jam spertas tuj post la alveno.

Rousseau-Paris:

La historiaj kasteloj, kiujn mi vidis dum la veturado, memorigas min pri mia patrolando.

Profesorino Mellina, Milano:

Venante el la lando de antikvaj trezoroj mi admiras la mirindan arton de Vieno.

Kozlevzar-Ljubljana, Jugoslavio:

La salutvespero je la komenco kunigis 22 naciojn.

Robert Kreuz, specialkomisaro por Liechtenstein:

S-ro ministro por Komerco kaj Trafiko Fritz Stockinger honorigis la konferencon, malfermante ĝin en la Parlamenta Palaco kaj salutante en la nomo de sinjoroj la Federacia Prezidanto kaj Kanceliero.

Alseika-Litovujo:

Por la enkonduko de Esperanto en la lernejon parolis en trafa maniero landa instruinspektoro kortega konsilisto d-ro Wollmann.

Vickonsulo Altar de Peruo, Ameriko:

Aparte varme kaj konvinkige elmontris kortega konsilisto inĝeniero Petritsch, profesoro en la Teknika Altlernejo en Vieno, la vidpunkton de scienco kaj tekniko pri la necesa adopto de la internacia helplingvo.

Univ. prof. d-ro Odo Bujwid, Kraków:

D-ro inĝ. Wüster, membro de la germana komisiono de normigo, salutis en la nomo de la Unio de la industriuloj de Aŭstrio kaj paroladis pri lingva normigo.

Ĝeneralkonsulo Adolfo Weiss, Portugalujo:

Ne nur mi, sed la tuta publiko kun surprizo konstatis la utilon de la nova konferenc-tekniko, aplikita en la tradukado de la paroladoj nacilingvaj.

Lektoro Beckmann, Karlskrona, Svedujo:

Ĉiu parolado en nacia lingvo estis tradukita nur en Esperanton.

Prezidanto Stettler, Bern:

Kian simpligon signifas tio kompare al la aliaj internaciaj kongresoj.

Prof. Dalmau, Barcelona, Katalunujo, Hispanujo:

Tiu ŝparo de energio kaj tempo per la aplikita konferenc-tekniko estos certe imitata de aliaj organizacioj.

Prof. Kilian, Trebic, ĈSR:

La rezulto de la konferenco estas kolekto de abunda kaj utila materialo. Ĝi estos publikigata kaj utiligata por interesigo al oficialaj instancoj en la diversaj landoj.

Kowatschew, Ruse Bulgarujo:

Speciale hororiga por ni estis la vere afabla kaj agrabla akcepto ĉe lia ekscelenco la aŭstria ŝtatprezidanto. Estas plie plezuro por ni, sekvi la ŝatindan inviton al teo ĉe lia moŝto sinjoro la ministro de publika instruado.

Vickonsulo Pyykkö, Finnlando:

La fame konata kanceliero de Aŭstrio s-ro Dollfuss, mem ĉeestis kaj ni ĉiuj estis ravitaj pri lia afableco kaj ĉarmo.

S-ino de Szabo, Budapest:

Ni forlasas Vienon, ĉiam pensante pri la belaj kaj agrablaj tagoj kaj en konstanta memoro pri la ĉarmo de Vieno kaj de la Vienanoj.

S-ano Steiner-Vieno anoncis ĉiujn paroladojn kaj fine por la germana publiko tradukis la tutan impresaron en la germanan lingvon.

Ĵaŭde: Rondveturado per aŭtomobiloj tra Vieno sub gvidado de prez. Steiner. Vespere festprezentado en fama operdomo „Fidelio" de Beethoven. Kantis niaj unuarangaj solkantistoj.

S-roj insp. Schwartz-Strasbourg kaj Vavrovsky-Praha en ĉeesto de polica vicprezidanto d-ro Skubel, anstataŭante la policprezidanton d-ron Seydl, metis florkronon al la memortabulo de d-ro Schober en la policdirekcio. D-ro Skubel en ĉeesto de kort. kons. Dr. Veigl dankis per belaj vortoj al s-ro Schwartz pro liaj rememorvortoj pri mortinta policprez. Schober kaj pro la florkrono. S-ro Schwartz ankaŭ faris paroladon en la festsalonego de polic lernejo pri „E. kaj la polico", kiun ĉeestis 120 personoj. Ambaŭ aferojn arangis s-ano Steiner.

Multan rekonon kaj aprobon trovis la laŭcela program-aranĝo. La antaŭtagmezoj estis plene destinitaj al serioza laborado. Posttagmeze la konferencanoj ekskursis al iuj de la belaj lokoj de la ĉirkaŭo de Vieno por ripozi, babili, konatiĝi kun la bel joj de lando kaj popolo. Tiamaniere la kontakto inter la konferencanoj fariĝis tre bona kaj agrabla. Ĝi ankaŭ ebligis interŝanĝon de ideoj pri la temoj pritraktitaj kaj per tio nerekte faciligis la laborojn mem.

Kiel tuto la konferenco estis unika sukceso!

Precipe, se oni konsideras la eksterordinare malfacilan periodon, en kiu ĝi okazis kaj la limigitaj rimedoj, pri kiuj disponigis la prepara komitato, ĉiuj konferencanoj, eĉ la kutimaj plendemuloj esperantistaj, estis kontentaj pri ĉio, kion ili povis ĝui, kaj forlasis la urbon kun agrablaj memoroj.

Radio-Esperanto-Auslandsdienst.

20. junio: „Kabloŝvebfervojoj aŭstriaj" (Maria Fiedler).

27. junio: „Pri aŭstriaj kuraclokoj" (Reg. kons. Steiner).

4. julio: „Institucioj por blinduloj en Aŭstrio" (D-ro M. Geffner).

11. julio: „La Katedralo de Sa. Stefano" (Ĝen. dir. d-ro A. Brunauer).

Bonvenon al belega Svedlando!

26-a Universala Kongreso de Esperanto 1934 Stockholm 4-11 aug.

Adreso: Fredsgatan 4, Stockholm.
Kotizo: 25. sved. kr.
Teatro: Oni prezentos „Ludi per fajro" de Strindberg.

LKK klopodas, por vere agrabligi al vi la restadon. Bedaŭre ĝis nun el Aŭstrio neniu aliĝis. Ne hezitu kaj tuj aliĝu. Vi havas la plej bonan okazon, veturi rabatite al Stockholm, se vi aliĝas al la itala karavano. Kontraŭ respondkupono ni donas al vi koncernajn informojn.

Stockholm estas vere alloga, belega urbo kaj la svedlandanoj estas afablaj.

Svedlando estas jam duone konkerita de la svedaj esperantistoj. Se **vi** venos al la kongreso, la plena venko certe tuj venos!

Krome Esperanta Turista Komisiono (prez. E. Malmgren) multe klopodas montri al vi plej malmultekoste la belan Svedlandon!

La registaro konsentis **„senpagan pasportvizon"**.

Fervoja rabato en Svedujo: 25 %.

Loka Kongresa Komitato.

Antaŭkongreso en Malmö:

Adreso: Esperantokongreso, Malmö, Svedlando.

Kotizo: 5 sved. kr., por kiu vi havos multajn avantaĝojn.

Bela riĉa programo dum 2. kaj 3. aŭgusto.

Petu informojn kaj, veturante al Stockholm, ne preterlasu ĉeesti en Malmö.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.